



Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997


La 37^{an} jaron



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k140/k140.html>

Kelkaj personoj ŝajnas anĝeloj. Kelkaj el ili pravas ĝin pere de siaj agoj.



Tri hispanoj elstaraj

Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

el la Sudo

Sociala adreso: kajeroj@gmail.com

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**

Redaktas: **Jesuo de las Heras.**

Korektas: **Jozefo Pina.**

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

ISSN 1886-1938 (printita)

ISSN 1886-1997

Depósito legal: Z-2398-88

Enhavo

Redaktore: Sebto.....3

Historio:

Pastro Marjana.....5

La homo, kiu amnestiis sorĉistinojn.....13

Kinarto: Pako Rabal.....9

Beletro: *Defendo de Hispaneco:*

Naturalismo.....18

Ruben' Dario kaj talento.....21

**Pri la enhavo de la
artikoloj respondecas
ties aŭtoroj, ne la
redakcio**

Nesubskribitajn artikolojn
verkis la redaktoro

Kovrilo: Tri elstaraj hispanoj: Pastro Marjana, pensisto kaj verkisto de la 16^a jarcento; Pako Rabal, internacie fama aktoro de la 20^a jarcento; kaj Alonso de Salazar y Frías, pastro kaj avangarda pensisto, ĵuristo kaj enketisto de la 17^a jarcento.

**Ni ne korespondos pri
nepetitaj artikoloj,
kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon,
kiun ni trovos interesa**

Pagmaniero: aliĝo al HALE kontraŭ €10
rajtigas ricevi nian surpaperan version. Se vi
deziras kontribui per aliĝo, kontaktu la redaktoron:

kajeroj@gmail.com

**Celo de ĉi tiu publikaĵo estas defendi kaj
ekzerci liberecojn pri penso kaj esprimo**

Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj: **Scribus,**
Bluefish, LibreOffice, Gimp, kaj Yafc

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro



Redaktore

Denove ni venas prokraste antaŭ vi, leganto, kun nova **Kajero el la Sudo**, tiu de julio, eĉ se ĝi aperas aŭguste. Kvankam ĝi estas dediĉita al tri elstaraj hispanoj —kvar, se ni kalkulas kun Ramiron de Maeztu, kies ĉefverkon ni legas de kelkaj jaroj—, nia prokrasto utilas nun al komento pri la gravaj aferoj, kiuj okupas la amasmediojn hispanajn kaj eksterlandajn pri Sebto, unu el niaj du urboj afrikaj.

Eksterlandoj sendube demandas sin pri tio, kio okazas en Hispanio. Jes, estas neeble nei tio, ke nia lando estas diferenca, ĉu ne? Nunaj tempoj alportas al ni eventojn, kiujn neniam antaŭe ni travivis. Jes, *Hispanio estas diferenca!*, kiel tiu fama slogano proklamis dum la lastaj jaroj de Frankismo.

Tiutempe la celo estis altiri turistojn al nia lando por ke ili lasu siajn fremdan monon ĉi tie. Sed nun venas ne nur turistoj, sed ĉefe kontraŭlegaj enmigrintoj. De ĉiam estas kondiĉoj por eniri alian landon en la mondo. Se oni deziras, ekzemple, viziti Marokon, oni devas alporti pasporton, monon sufiĉan por resti tie dum la tempo,

Sebto

Sebto elfore



kiun oni intencas, kaj havi hotelĉambron, aŭ almenaŭ lokon kie oni povos dormi. Sufiĉe logike, ĉu ne?

Sed laste ni atestis, ke pli ol sesdek mil homoj perforte venis en hispanan urbon Sebto (Ceuta, hispane) sen tio, ke la polico hispana povis malebligi tion. Ĉu nia registaro sciis pri tiu plano? Laŭ ties memdiro, ne, laŭ la polico mem, jes. Ili raportis al registaro pri tiu intenco sufiĉe frue por ke la armeo estu lokata ĉe la landlimo, sed oni faris nenion. Sekve, dekoj da miloj da homoj eniris la urbon kaj vagadis sen vestaĵoj, sen manĝaĵoj, sen celoj. La loĝantoj de Sebto ne kuraĝis eliri siajn hejmojn, kaj komercistoj ne kuraĝis malfermi siajn lokojn.

Venas la problemo, laŭ mi, de konsidero populara —almenaŭ en Hispanio— pri tio, ke ne temas pri krimuloj, sed pri homoj, kiuj nur serĉas pli bonan vivon en Eŭropo, ne necese en Hispanio. Tamen, Hispanio estas Eŭropo, kaj la ceteraj landoj de

nia kontinento protestas, ĉar enirinte nian landon, ili rajtos translokiĝi en la ceteran Eŭropon. Pro tio dudek du landoj jam petis, ke oni nuligu la spacon ŝengenon por Hispanio por malebligi tion. Laŭ mi tio estas prudenta movo, kaj oni devus fari tion tiom longe kiom la nuna registaro de Hispanio estos en potenco.

Mi ne dubas, ke multaj homoj ne vidas kongrue, ke ni havadas du urbojn en Afriko, Sebto kaj Meliljo, kaj samtempe ni petas Brition redoni al ni la urbon kaj teritorion de Ĝibraltaro. Eĉ en naiva verko de Stieg Larsson, *La viroj, kiuj ne amis virinojn*, Lisbeth Salander demandas al si ekzakte tiun aferon: *Kial hispanoj petas Ĝibraltaron, kaj samtempe tenas du urbojn en Maroko?* Sed la du aferoj ne estas samaj: Sebto kaj Meliljo estis hispanaj multe pli frue ol Maroko ekzistis, dum Ĝibraltaro estis cedata kiel militpredo post la Milito de Sukcedo je 1713^a, kune kun la insulo Menorko. Poste Anglujo redonis la insulon, sed ne Ĝibraltaron, pro tio, ke de ĝi oni povas kontroli la ŝipfluon en kaj ekster Mediteraneo. Kaj tio ne okazis antaŭ Hispanio ekzistis, sed pli ol miljaro post nia lando sendependiĝis. Eble oni ne memoras, ke pro tiu packontrakto de Utreĉ, Hispanio devis akcep-

ti disvendadon da sklavoj en Hispanameriko, kie ĝis tiam sklaveco ne ekzistis, male al tio, kio okazis en Usono kaj anglaj teritorioj de Ameriko. Sed ni parolos pri tio alian fojon.

Se Sebto kaj Meliljo iam apartenos al la Reĝlando de Maroko, ties loĝantoj iĝus subuloj anstataŭ civitanoj. Mi iam aŭdis en Kongreso de Esperanto, ke *Israelio estas Eŭropo*, kaj tio ŝokis min, ĉar klare ĝi estas en azia kontinento. Tamen, mi komprenas, ke la civilizo kaj kulturo israelaj estas eŭropaj, aŭ tiom simila al eŭropa, ke oni ne povas klare vidi la diferencojn. Sed Sebto kaj Meliljo estas kaj kulturo, kaj civilize, kaj gente tute eŭropa, kvankam marokanoj jam vivas tie ankaŭ, homoj, kiuj laŭleĝe eniris la urbojn kaj iĝis hispanoj laŭ niaj reguloj kaj kulturo.

Mi invitas tiujn homojn, kiuj pledas, ke enmigrintoj rajtas serĉi pli bonan vivon eĉ kontraŭleĝe, ke ili gastigu ilin en siaj propraj hejmoj. Mi ne tion faros, ĉar mi postulas, ke oni devas honori leĝon, ĉar tio diferencigas nin disde barbaroj. Se oni deziras veni en Eŭropon, oni honori la leĝojn de Eŭropo. **Dura lex, sed lex**, diris romianoj: Leĝo povas esti dura, sed tamen **observenda**.



Pastro Marjana

PEDRO CARLOS GONZÁLEZ CUEVAS

Sekvante la antropologon Clifford Geertz, oni povas diri, ke ekzistas tri apartaj kulturaj perspektivoj por difini la formiĝon kaj de individuoj kaj de kolektivoj: la religia, la scienca kaj la estetika.

Laŭ nia opinio, la superreganta faktoro en la hispana kunteksto estis la religia, ĝis la 20^a jarcento, almenaŭ. Kaj efektive, sendube, la plej signifa faktoro en la politika kaj kultura formadoj de la hispana nacieco estis la kristana tradicio en sia katolika variaĵo; kaj en la materialoj portataj de ĉi tiu tradicio.

Katolikismo dotis la diversajn tendencojn de la hispana penso per serio da filozofiaj, teologiaj kaj politikaj supozoj, kiel ekzemple providencialismo, la eskatologia perspektivo kaj la ĉesto de klare naturaj juraj elementoj, percepteblaj en la kritiko de Makjavelo kaj en la diskutoj pri la signifo de la malkovro de Ameriko. La Baroka kaj Kontraŭreforma periodoj markis la apogeon de ĉi tiu kulturo, kies fundamento estis katolika politika teologio.

Unu el la plej reprezentaj figuroj de ĉi tiu kulturo estis, sendube, Pastro Juan de Marjana,



kies morton antaŭ kvarcent jaroj oni nun memorigas.

Naskita en Talavera en marto 1536, li estis baptita la 2^{an} de aprilo kiel filo de nekonataj gepatroj, kvankam ekzistas suspektoj, ke lia patro estis la Dekano de Talavera, Juan Martínez de Marjana. La nomo de lia patrino estis Bernardina Rodríguez. Tre juna, li estis sendata studi ĉe la Universitato de Alkala', kie li restis nur mallonge, akceptite kiel membro de la Societo de Jesuo en 1554. Li kompletigis siajn komencajn ekleziajn studojn ĉe la seminario de Simankas kaj daŭrigis siajn studojn pri teologio kaj klasikaj lingvoj denove en Alkala'. Poste, li estis sendata de la Societo al la Roma Kolegio kaj poste al la Sorbono, ankaŭ por instrui teologion, kie li doktoriĝis. Pro supozeblaj sankauzoj,

Marjana, kiu vivis ĝis okdek ok jaroj, petis sian translokigon al Hispanio, kie li estis sendata al Toledo en 1574. Ĉiukaze, ĉi tiu denaskulo de Talavera estas unu el la plej universalaj hispanaj pensuloj. Teologo, historiisto, politika pensulo kaj ekonomikisto, liaj verko kaj vivo estis studotaj de pastroj, politikaj pensuloj, historiistoj kaj ekonomikistoj, kiel Alonso de Andrade, Jaime Balmes, Francisco Pi y Margall, Joaquín Costa, Francisco Garzón, Marcelino Menéndez Pelayo, Ignacio Valentí, Jorge Cirot, Pedro Urbano González de la Calle, Marcial Solana, Manuel Ballesteros Gaibrois, G. Lewy, Alan Soons, Murray Rothbard kaj Gonzalo Fernández de la Mora. La preskaŭ kompleta silento pri Marjana en la pridubinda verko de José Luis Abellán, *Historia crítica del pensamiento español* (Kritika Historio de la Hispana Pensado), estas frapa. Ĉiuj akademiuloj kaj ekzegezistoj pri la indiĝeno de Talavera konsentas, ke li estis brila kaj klera homo, kaj samtempe fiera, obstina, kritika kaj ribelema. Pensulo tiel polemika en la vivo kiel li estos post la morto.

La respublikano Francisco Pi y Margall konsideris lin *perfida homo, hipokrita pastro*, kies *ĉefa ideo konsistis el ĉiopova teokratio*. Por la tradiciisto Marcelino Me-

néndez Pelayo, li estis *ia baptita stoikulo, senhalta cenzuristo de princoj kaj popoloj*. La liberal-libertariano Murray Rothbard priskribis lin kiel *ekstremisman akademiulon*, nekorupteblan moraliston, ĉiam kritikan pri la potenculoj, sed same kritikan pri la amasoj, kiel montras lia malakcepto de taŭrobatalado.

Marjana estis la granda historiisto de la baroka Hispanio.

Historiae de rebus Hispaniae komencis publikiĝi je 1592^a en Toledo kaj konsistis el dudek libroj komence, kaj tridek poste. Ekde 1601, ĝi aperis en la kastilia lingvo kiel *Generala Historio de Hispanio*. Ĝi estis dediĉata al Filipo la 2^a kaj poste al ties heredanto, Filipo la 3^a. La hispanisto Fernando Wulff konsideras ĝin la plej grava verko de hispana historiografio. En ĉi tiu verko, Marjana prezentas sin kiel disĉiplon de Livio. Li komencas sian verkon per geografia priskribo de Hispanio. La historio komenciĝas per la fruaj reĝoj, daŭras per la Rekonkero, kaj finiĝas per la morto de Ferdinando la Katolikulo. Li konsideras Kastilion kiel la nukleon de la nacio kaj Katolikismon kiel la spiritan fundamenton de la hispana popolo, ekde la konvertiĝo de Recaredo. La hispana trajektorio kulminas per la regado de Izabela kaj Ferdinando.

Ĉi tiu verko restis aktuala ĝis la 19^a jarcento, kiam Modesto Lafuente publikigis sian *Ĝeneralan Historion de Hispanio*. Tamen, Marjana estas pli konata en Hispanio kaj eksterlande kiel politika pensulo. *Pri la Reĝo kaj la Reĝa Institucio*, verkita en la latina lingvo, estis lia plej polemika verko, eĉ estante malpermesita kaj publike bruligita en Francio, post la atenco kontraŭ Henriko la 4^a fare de François Ravailac, ĉar ĝi estis interpretita kiel legitimiga reĝmortigo. Marjana argumentis, ke la absoluta potenco de la monarko devas esti moderigita de aliaj institucioj, kiel ekzemple la Eklezio, Katolikismo, ĉar per si mem ĝi emis al tirana eraro. Sekvante la principojn de natura juro, Marjana argumentas, ke tera justeco, ne nur kiel virto sed ankaŭ kiel konkreta historia ordigo de socia vivo, originas el Dio, kun la bono estante laŭleĝe efektivigita per natura juro. La justa ordo do ne estas homa kreaĵo, sed dia; ĝi estas parto de la kosma ordo, kaj la sola funkcio de la homo estas kompreni, apliki kaj defendi ĝin. Justeco estas kompleta nur en Dio, tiel ke homa justeco konsistigis nur neperfektan partoprenon en dia justeco. Marjana konsideras la Monarkion preferinda al la Respubliko, kiel regado de unu homo konsilata de elito de

saĝuloj, kaj kiu regas por la bono de la socio kiel tuto. Alie, se ĝi estas perversa, ĝi *finas en la plej granda ebla tiraneco kaj la plej abomena formo de registaro*. Tiraneco konsistas el la malobeco de la natura ordo. Ĝi estas la regado de avideco, arbitreco kaj pasioj. La tirano konas neniujn limojn aŭ leĝojn. La bona reĝo defendas la malfortulojn; administras justecon; serĉas la komunan bonon kaj volonte submetiĝas al la leĝoj; praktikas la leĝojn kun modereco; aŭskultas plendojn kaj peticiojn; strebas al la komuna bono kaj traktas siajn subulojn kiel siajn infanojn. Kontraste, tiranoj estas ĉiam malamataj. Kaj, pro tio, ili estas timataj, ĉar multaj estis mortigitaj, kio, en ekstremaj kazoj, estas komprenebla kaj eĉ pravigebla. Tamen, Marjana rekomendas, ke subuloj estu paciencaj pri la decidoj de la monarkoj, sed en tre gravaj kazoj, la monarko povas esti konsiderata publikan malamikon kaj povus esti ekzekutata, defende de sia popolo.

Kaj ĉi tiu povo forigi lin ne loĝas nur en la komunumo, sed en iu ajn individuo. La proponoj de Marjana havontas longdaŭran influon. Dum la Dua Respubliko, ili estis uzataj kiel kontribuantoj al la monarĥiista revuo *Acción Española* (Hispana agado) por pravigi la *rajton al ribelo* kontraŭ la sekularigaj kaj revoluciaj politikoj

de la maldekstraj registaroj.

La Reĝo ne estis cenzurata en Hispanio. La sorto de Marjana kiel ekonomia pensulo kaj socia kritikisto estis malsama. Kiel ekonomikisto, li estis interpretata kiel antaŭliberala, antaŭulo de John Locke. Aliaj, kiel Joaquín Costa, vidis lin kiel antaŭulon de Henry George kaj lia agrara kolektivismo.

Lia verko *De monetae mutatione*, verkita en 1609^a, en kiu li kritikis la monajn reformojn de Filipo la 3^a kaj lia favorato, la Duko de Lerma, provokis la proceson kontraŭ Marjana kaj la cenzuron de la libro. Kiel Joseph Schumpeter atentigis, la problemo levita de Marjana estis ĉefe morala. La homo el Talavera kondamnis, ke malvalorigo kaj registara enmiksiĝo en la valoron de valuto povus nur kaŭzi gravajn ekonomiajn kaj sociajn problemojn. Malvalorigo estis kaŝata imposto, kiu ŝarĝas la privatan posedaĵon de subuloj. Krome, neniu monarko havas la rajton trudi impostojn sen la konsento de la socio kiel tuto. Je sepdek tri jaroj, Marjana estis malliberigata kaj procesata pro sia defendo de ĉi tiuj principoj. Li estis akuzata pri la krimo de malrespekto. La tribunalo deklaris la jezuiton kulpa, sed la papo rifuzis puni lin, do li fine estis liberigata. Ta-

men, la libro estis plene cenzurata kaj elpurigata.

Kiel nekoruptebla viro, Marjana ne hezitis kritiki sian propran religian ordenon, en sia *Diskurso pri la Malsanoj de la Societo*, kie li kondamnis ĝian rigidan, preskaŭ militistan disciplinon.

Ĉi tio provokis la cenzuron de Claudio Acquaviva, Ĝenerala Superulo de la Societo. Tamen, Marjana ne revokis siajn poziciojn; kaj Acquaviva fine forlasis la polemikon.

Marjana mortis la 17^{an} de februaro 1624^a, en Toledo. Kvarcent jarojn post lia morto, ni povas konsideri la jezuiton ekzemplo por sekvi, ne nur pro liaj inteligenteco, saĝo, kaj erudicio, sed ankaŭ pro lia nekoruptebla digno kaj kritika spirito. En ĉi tiu malhela horo por Hispanio, personecoj de tiu kuraĝo estas bezonataj, fronte al la konformisma atmosfero. Ĉar ni devas reakiri unuecon, dignon kaj politikan dececon.

Kaj tiam la ekzemplo de Juan de Marjana denove estos aktuala, por gvidi nin reen al la estonteco.

Fuĝi de konformismo kaj bana-leco estas hodiaŭ kategoria morala, politika kaj socia imperativo.

Kino

Pako Rabal'

Antaŭ kelkaj monatoj mi trovis ĉe la urbodomo de Mazarrón, urbo kie mi loĝas, informon pri kurseto pri kinarto. Allogata de la ideo, mi enskribiĝis pro tio, ke kino ĉiam altiris min, kaj subite mi trovis min je la ebleco lerni ion pri la magia mondo de tiu arto. La kurso komenciĝis fine de februaro kaj finiĝis je la komenco de julio unu semajnfino monate, po ok horoj. La kurso inkluzivis teorion, praktikon kaj filmadon pri mallonga filmo. Deko kaj duono da geamatoroj kunvenis sub la zorgo de reĝisoro Benito Ra-

bal, kiu sukcesis krei la filmeton ***Najbaroj, ebla rakonto***. Temas pri loĝkomunumo de luantoj, kaj ties problemoj, kiam avareco de vulturfundo aperas.

La etoso estis gaja kaj vekis mian intereson pri la direktoro mem, Benito Rabal' kaj pri ties patro, fama aktoro **Francisco Rabal Valera**, laŭsiadire Pako Rabal', kaj, sekve, pri la filmoj faritaj kaj de la patro kaj de la filo.

Pako Rabal' estis unu el la plej gravaj kaj plej rekoneblaj aktoroj de la hispana kino en la lasta jarcento. Li naskiĝis la 8^{an}



Pako kaj Marga Lopes interparolas serioze en 1960^a filmo *La homo de la insulo*, reĝisorita de Vicente Escrivá.

de marto 1926^a en Klino de l' Gos, kampara loko apud urbo Águilas, en la regiono Murcio, en modesta familio ligita al min-laborado. Kiam li estis ankoraŭ infano, la familio translokiĝis al Madrido pro ekonomiaj malfacilaĵoj. Tie lia patro laboris ĉe fervojaj tuneloj, dum la juna Pako devis frue konatiĝi kun laboro, malriĉeco kaj la malfacila ĉiutaga vivo de ordinaraj homoj. Tiuj spertoj poste fariĝis grava parto de lia homa sentemo kaj de la kredindeco, kun kiu li prezentis kamparanojn, laboristojn, malriĉulojn kaj homojn marginigitajn de la socio.

Rabal ne ricevis longan formalan edukadon. Kiel adoleskanto li laboris interalie kiel elektrikiston en filmstudioj, kie li povis observi de proksime la tehnikon kaj arton ĉe l' mondo de kino. Li komencis aperi kiel figuranto kaj en tre malgrandaj roloj, sed lia forta ĉeesto, lia profunda voĉo kaj lia natura maniero kondukti antaŭ la kamerao baldaŭ altiris atenton. La poeto Dámaso Alonso, kiu konis lin, rekomendis lin al Ludoviko Escobar, tiutempe direktoro de la Teatro María Guerrero. Tio malfermis al li la pordon de la profesia teatro. Je 1947^a li ricevis malgrandan rolon, kaj iom poste Jozefi Tamajo dungis lin por la kompanio **Lope de Vega**, en kiu li lernis la metion apud spertaj aktoroj.

Teatro estis lia vera lernejo. Li ludis en gravaj verkoj kiel *La morto de vendisto*, de Arturo Miller; *Edipo*, de Sofoklo; kaj *Julio Cezaro*, de Vilhelmo Ŝekspir. Sur la scenejo li lernis regi la voĉon, la korpon, la silenton kaj la ritmon de dialogo. En la kompanio Lope de Vega li ankaŭ ekkonatiĝis kun aktorino Asunción Balaguer, kun kiu edziĝis je 1951^a. Amuze estis, interkrampe, ilia unua konversacio: iu prezentis lin al ŝi, kaj li diris:

—Ho, sinjorino! Ĉu vi kataluna? Ĉu vi konas la ŝercon pri tiu nigrulo, kiu sopiris *Ho, ve, kiel multe plaĉus al mi esti blankulo, eĉ se kataluno!*

Kaj ŝi, kompreneble, foriris malkontente, klariginte al li kiom malĝentila kaj aĉmaniera li estas!

Sed tamen ili parolis abunde poste, ĝis ili geedziĝis baldaŭ poste, tiel ke la geedzeco daŭris dumla resto de iliaj vivoj, kaj iliaj infanoj **Teresa** kaj **Benito** poste ankaŭ laboris en la mondo de spektaklo kaj kino. Kvankam Rabal ĉiam konservis profundan amon al teatro, ekde la komenco de la 1950^{aj} jaroj li iom post iom elektis kinon kiel sian ĉefan profesion.

Pako laboras kun *onklo* Ludoviko Bunjel' en Meksikio (arta rekonstruo de chatGPT).



En sia unua granda periodo en hispana kino li ofte aperis kiel juna herooaŭ vira protagonisto kun forta fizika ĉeesto. Li ricevis gravan fruan agnoskon pro *Hay un camino a la derecha* (Estas vojo dekstre), *La guerra de Dios* (La milito de Dio), kaj *Amanecer en Puerta Oscura* (Sunleviĝo je pordo mal-luma). Tamen la decida renkontiĝo en lia kariero estis tiu kun *Luis Buñuel*. Sub la direkto de tiu fama hispana kinreĝisoro li interpretis la pastron en *Nazarín* kaj la ambiguajn, profunde homajn figurojn de *Viridiana* kaj aliaj verkoj. Buñuel sciis uzi en Rabal samtempe noblecon, sensualecon, ironion kaj moralan maltrankvilon. Per tiuj filmoj la aktoro akiris internacian prestiĝon kaj fariĝis unu el la hispanaj vizaĝoj plej konataj eksterlande.

La internacia kariero de Rabal estis eksterordinare vasta. Li la-

boris kun Michelangelo Antonioni en *L'eclisse* (La eklipso), kun Luchino Visconti, Claude Chabrol, Jacques Rivette, Gillo Pontecorvo, William Friedkin kaj aliaj gravaj reĝisoroj. Li aperis en italaj, francaj, hispanamerikaj kaj usonaj produktadoj, kvankam li mem konfesis, ke lia malfacileco lerni lingvojn limigas lian karieran eblecojn. Lia aktorado ne dependis de eleganta teknika perfekteco, sed de io pli malfacile imitebla: absoluta vivo sur la ekrano. Li povis ŝajni severa, tenera, danĝera, humura aŭ kompatinda sen perdi sian internan veron. Lia raŭka voĉo, la intensaj okuloj kaj la karakteriza maniero movi la vizaĝon transformis lin en aktoron tuj rekoneblan.

Liaj 1970^{aj} jaroj estis pli malstabila periodo. Pako Rabal partoprenis en ambiciaj filmoj, sed ankaŭ en multaj neegalaj internaciaj kunproduktaĵoj, parte pro profesiaj kaj ekonomiaj bezonoj.

Lia granda arta renaskiĝo venis en la 1980^{aj} jaroj, danke precipe al la reĝisoro Mario Camus. En *Los santos inocentes* (La sanktaj senkulpuloj), laŭ la romano de Miguel Delibes, Rabal kreis la neforgeseblan rolon Azarías, malriĉan kamparanon kun intelekta handikapo, infana tenero kaj profunda ligo al la naturo. Por prepari la rolon, li studis la parolmanieron kaj la vivon de la kamparanoj de Ekstremaduro. Lia interpreto evitis sentimentalecon kaj montris la humiligon de homo submetita al kruela socia ordo. En 1984^a li kunhavis kun Alfredo Landa la premion por plej bona aktoro en la Festivalo de Kans (Cannes), Francujo.

Post tiu triumfo komenciĝis nova matureca etapo. Rabal jam ne estis la bela junulo de la 1950^{aj} jaroj, sed aktoro kapabla porti sur sia vizaĝo tutan historion de Hispanio. Li brilis en filmoj kiel *Padre nuestro* (Nia patro), *El disputado voto del señor Cayo* (La disputata voĉdono de Sinjoro Kajo), *¡Átame!* (Ligu min!) kaj *El hombre que perdió su sombra* (La homo, kiu perdis sian ombron). En televido li atingis grandegan popularcon kiel la eksan taŭroluktisto en la serio *Juncal* (Ĥunkal'), reĝisorita de Jaime de Armiñán. Fine de la 1990^{aj} jaroj Karlo Saŭra (Carlos Saura) elektis lin

por interpreti la maljunan pentriston Fransisko de Gojo en *Goya en Burdeos* (Gojo en Bordojo). La rolo, plena je memoro, doloro, pasio kaj proksimeco al morto, ŝajnis kunigi la tutan vivsperton de Rabal. Pro ĝi li ricevis la **premion Goya** por plej bona ĉefa aktoro.

Pako Rabal estis ne nur profesia interpretisto, sed ankaŭ homo kun forta socia kaj politika konscio. Dum la frankisma diktaturo li proksimiĝis al la kontraŭfrankisma maldekstro, aliĝis al la tiam kontraŭleĝa Komunista Partio kaj subskribis protestojn kontraŭ subpremo. Tia sinteno kelkfoje malhelpis lian karieron en Hispanio. Li tamen ne konstruis sian publikan bildon kiel malproksima intelektulo. Li konservis popularan, rektan kaj varman kondutmanieron, kaj multaj kolegoj membris lian sindonemon, gastamon kaj fortan senton de amikeco. Li estis profunde ligita al Mursjo kaj al sia naskiĝloko, eĉ post kiam lia laboro igis lin vojaĝi tra granda parto de la mondo.

Li mortis la 29^{an} de aŭgusto 2001^a dum aviadila vojaĝo de Montrealo al Madrido, post ricevi premion omaĝe al lia tuta kariero. La aviadilo devis alteriĝi en Bordojo, la urbo ligita al lia lasta granda rolo kiel pentristo Gojo. La jam anoncitan

Premion Donostia oni transdonis postmorte dum la Festivalo de San Sebastjan', kaj lia nepo Liberto Rabal ricevis ĝin en lia nomo. Tiu fino havis preskaŭ kinematografian cirklecon: granda aktoro foriris tuj post internacia omaĝo, proksime al urbo, kiun li ĵus igis parton de sia arta legendo.

La heredaĵo de Paco Rabal restas viva, ĉar liaj plej bonaj interpretoj ne apartenas nur al unu epoko. Ili daŭre parolas pri malriĉeco, potenco, digno, deziro, maljuniĝo kaj la bezono esti vidata kiel homo. Li kunigis la tradicion de la klasika teatro, la aŭtoran kinon de Buñuel kaj Antonioni, la socian realismon de Mario Camus kaj la novajn vojojn de reĝisoroj kiel Almodovar kaj Saŭra. En 2026^a, cent jarojn post lia naskiĝo, Murcjo dediĉis al li novajn omaĝojn kaj kreis premion portantan lian nomon. Sed lia vera monumento troviĝas en kino: en la rigardo de Nazarín, en la korpa kaj anima fragileco de Azarías, en la voĉo de Juncal kaj en la maljuna Gojo, kiu rememoras sian vivon antaŭ la mallumo.

Historio

La homo, kiu amnestiis sorĉistinojn


Iam mi havis la ŝancon viziti la Muzeon de la Inkvizicio en Toledo. Post zorga rigardo al la ekspoziciaĵoj mi eliris kun la sento, ke oni ĵus trompis ne nur min, sed ankaŭ ĉiujn, kiuj trapasis tiun lokon. Muzeoj dediĉitaj al kondamno de la Hispana Inkvizicio abundas en multaj eŭropaj landoj, precipe en tiuj, kiuj — kiel Germanio aŭ Ĉeĥio — havus plej multe da kialoj silenti. Mi klarigos kial.

Unue, la instrumentoj montrataj en tiaj muzeoj — kompreneble ankaŭ en tiu de Toledo — ne estas torturiloj, sed ekzekutiloj: se oni enfermus homon, ekzemple, en specon de sarko-



Rekonstruo arta de Alonso de Salazar y Frías (1564-1636), bazita sur historiaj priskriboj. Ne konserviĝas aŭtenta portreto

fago plena je pikiloj kaj interne de la kovrilo kaj en la fundo, kiam ĝi fermiĝus, la viktimo mortus aŭ pro trapiko de grava



Portado de la *Relación del Auto de Fe de Logroño* (1610),
kie aperas Alonso de Salazar y Frías kiel unu el la
inquisidoreir de la tribunalo. (Eldono de 1820.)

organo aŭ pro amasa sangoperdo.

Malgraŭ tio, oni daŭre riproĉas torturon al la Inkvizicio. Sed torturo estas tiel malnova kiel la homaro mem. Jam antaŭ du mil jaroj, aŭ pli, la romianoj asertis, ke konfeso akirita sen torturo ne valoras. Ĉu la konfeso poste restos netaŭga por normala vivo, tio al ili estis indiferenta. La Hispana Inkvizicio tamen ne uzis tiajn aparatojn, ĉar la doloro, kiun oni rajtis kaŭzi al akuzato, estis reguligita. Tia limigo ne ekzistis

en aliaj lokoj, kie, pro manko de inkvizicio, ne estis reguligitaj nek la torturo nek la jura proceduro — ĉar vera proceduro ofte eĉ ne ekzistis. En Germanio, Svedio kaj multaj aliaj regionoj sufiĉis, ke iu estu akuzita pri sorĉado, por ke la homamaso lin linĉu; poste neniu aparta persono respondecis pri la murdo. Tial en Germanio oni nombris pli ol dudek mil mortigojn pro akuzo pri sorĉado, dum al la Inkvizicio oni povas atribui nur malpli ol cento dum pluraj jarcentoj de ekzisto.

Oni ofte svingas la ekzemplon de Zugarramurdi, kie, laŭ la popola rakonto, multaj sorĉistinoj estis bruligitaj en 1610^a. Sed tio ne estas vera. Tie oni procesigis **53** personojn, el kiuj **nur ses atingis la ŝtiparon**, pro diversaj kaŭzoj. Oni ankaŭ ne forgesu, ke la Inkvizicio mem ne mortigis: ĝi juĝis kaj, se konvene, kondamnis; sed la laika, tio estas la civila, aŭtoritato plenumis la verdikton. Eĉ tiel oni ne agis facilnime. Post la denuncoj, de januaro ĝis novembro 1609^a okazis la jura proceso, dum kiu oni protokolis la deklarojn de multaj atestantoj. Kiam la proceduro finiĝis, la konkludoj estis transdonitaj al la civila aŭtoritato, kiu efektivigis la ekzekuton. Aliloke en Eŭropo ne ekzistis similaj garantioj, kaj la nombro de ekzekutoj pro sorĉado, anstataŭ esti iom



Jen la kaverno de Zugarramurdi (Navaro), kie okazis la plej fama sorĉista proceso de la hispana historio

malpli ol cent dum pluraj jarcentoj — kiel en Hispanio — superis kvindek mil; proksimume duono el ili okazis en Germanio.

Kio malhelpis, ke la proceso de Zugarramurdi fariĝu la komenco de pliaj similaj procesoj? Sendube la senlaca kaj obstina agado de katolika pastro, Alonso de Salazar y Frías. Li estis lastmomente nomumita membron de la tribunalo, kiu devis juĝi la akuzitojn de Zugarramurdi, kaj li senĉese esprimis siajn dubojn. Sed ĉar li troviĝis en la malplimulto, li ne povis

eviti la tragikan finon de tiuj ses kompatinduloj, kiuj vivaj forbrulis sur la ŝtiparo.

Dum la sekvaj jaroj li tamen studis la tutan dokumentaron kaj denove pridemandis ĉiujn atestantojn, akompanate de pluraj sekretarioj kaj tradukistoj de la eŭska lingvo. En la deklaroj, kiujn la tribunalo konsideris kiel pruvojn, li trovis amason da kontraŭdiroj kaj absurdaĵoj. Li registrigis ĉion en protokoloj, ankoraŭ hodiaŭ konsulteblaj, aranĝitaj en kvin dikaj volumoj. Fine li konkludis, ke sorĉado kaj paktoj kun la Diablo ne ekzistas.

Li eĉ formulis frazon, kiu eniris la historion: **Ekzistis nek sorĉistinoj nek sorĉitoj en tiu loko, ĝis oni komencis paroli kaj skribi pri ili.** Pro tio en Hispanio ne plu okazis bruligoj de sorĉistinoj, dum la cetero de Eŭropo daŭrigis sian sorĉistinĉasadon ankoraŭ du jarcentojn.

Jen kion diras al ni la historio. Kial do oni plu kulpigas la Hispanan Inkvizicion pri obskurantismo kaj sorĉistinĉasado?

Ĝis relative lastatempe Hispanio estis la plej katolika lando en la mondo. La Hispana Imperio — kvankam ĝi efektive ne nomiĝis tiel, sed **Hispana Krono** — bazu sian disvastiĝon kaj sur sia lingvo kaj sur sia religio. Tiu, la Katolika Religio, estas la religio de amo. Ĝia plej grava maksimumo parolas ĝuste pri tio: *Amu unu la alian, kiel mi amis vin. Per tio oni scios, ke vi estas miaj disĉiploj.* Kaj ĝin sekvas alia, ne malpli grava, sed multe pli ŝoka en mondo, kie la malamikon oni detruas: *Amu vian malamikon.*

La sekvantoj de Lutero, kontraŭe, opinias, ke tiu, kiu faras ion, pagu por ĝi. Krome ili diskriminacias siajn kontraŭulojn kaj batalas kontraŭ ili. Jen la malĝoja sorto de tiom da nordamerikaj triboj, kontraste kun tiuj de la sudo, kies teritoriojn nek la angloj nek usonanoj poste povis

forpreni dum ili troviĝis sub la Hispana Krono. Ili ambaŭ neniam honte hezitis deklari, ke la indianoj ne estas personoj. Vidu kiel pruvon tiom vasteco da filmoj pri la konkero de l' okcidento de Usono! Ĉar historio rakontas pri ties uzado de ĉiujn rimedoj je sia dispono — inkluzive de bakteriologia milito — por ekstermi ilin aŭ, kiam ili estis tro multnombraj, peli ilin en rezervujojn sen sufiĉaj rimedoj por garantii dignan vivon.

Alivorte: tie, kie la katolikoj integris la tiel nomatajn sovaĝulojn kaj garantiis al ili la samajn rajtojn, kiujn ili mem havas, ĉar ili konsideris ilin **infanoj de Dio**, la protestantoj rigardis ilin kiel ion alian: rektajn rivalojn, kiujn oni devis senigi je iliaj teroj, riĉofontoj kaj eĉ vivoj.

Kaj tamen estas vaste disvastiĝita la ideo, ke ĝuste la hispanoj *koloniigis* Sudamerikon kaj senigis la indianojn je iliaj rajtoj, teroj kaj vivoj. Tio estas mensogo, same kiel la tuta **Nigra Legendo**, falsa kiel ĉiu legendo. Hodiaŭ oni nomas ĝian neadon *Roza Legendo*. Sed ne ekzistas alia Roza Legendo ol tiu, kiu **silentigas la krimojn de angloj kaj usonanoj** — kaj de la ceteraj eŭropaj koloniigaj landoj — en Ameriko kaj en la cetera mondo.

La Nigra Legendo komenciĝis iom pli frue, sed disvastiĝis poste danke al la invento de la presarto, ekde la dekseca jarcento. Estas malĝoje konstati, ke eĉ hodiaŭ multaj hispanoj plu englutas ĝin. Temas pri tiuj, kiuj ĉiam diras, ke ĉio fremda estas pli bona, kvankam historio montras al ni la malon.


Konata estas la kazo de nia Isaac Peral, inventinto de la plej progresinta armilo de sia epoko. Lin neglektis kaj atakis kaj la propraj samlandanoj kaj la fremduloj, kvankam lia invento povintus plilongigi la ekziston de la Hispana Imperio kaj verŝajne renversi la detruan agadon de Anglio kontraŭ Sudameriko, efektivigitan kun la nepre necesa helpo de perfidaj kreoloj. Poste estis ĝuste tiuj kreoloj, kiuj vere rifuzis al la indiĝenoj la rajtojn, kiujn la hispanoj estis garantiintaj al ili per la Leĝoj kaj la Konsilio de Indioj.

Hodiaŭ oni honoras tiujn kreolojn per monumentoj kaj laŭdoj en historilibroj, kvankam

efektive ili estis mezvaloraj en ĉio krom en sia perfido kontraŭ Hispanio kaj kontraŭ siaj propraj popoloj. Ĉar la genocido kontraŭ indianoj en Sudameriko komenciĝis kun la sendependeco disde Hispanio, vera intercivitana milito eĉ se iliaj histori-libroj diras ion alian.

Jarcentojn post Alonso de Salazar y Frías, la Franca Revolucio nuligis la krimon de sorĉado, kaj tio estis prezentata kiel socian kaj kulturan progreson. Sed **Hispanio, denove, antaŭis tiun progreson je pluraj jarcentoj**, danke al genia hispano: don Alonso de Salazar y Frías. Katolika pastro.

Kaj ĝuste tio doloras la nuntempajn *modernulojn* kaj *progresistojn*: li estis ne nur **katoliko** kaj **pastro**, sed ankaŭ **hispano**. Homoj kiel don Alonso montras, ke **esti hispano estas motivo de fiero kaj honoro**. Kaj tiu malpuraĵo, kiu hodiaŭ regas en nia lando, povus forskui tiun damaĝan kruston de *moderneco* kaj *progresismo*, kiu senigas ĝin je ĝia plej meritplena heredaĵo.



Izaak' Peral' kaj ties nova armilo: submarŝipo



Defendo de Hispaneco

Ramiro de Maeztu

...Naturalismo.

En religiaj aferoj, oni povas adopti la ŝajne sendanĝeran formulon, ke nur fido savas nin, sed tiel farante, oni jam neas la potencon de racio, la potencon de volo, la potencon de religiaj praktikoj, la potencon de socia disciplino. La universo fariĝas arbitra. Kun la substanco de bonfaroj perdita, la vivo estas procesio de ombroj, kiuj venas kaj iras. Restas nur legi Omar Ĥajam kaj diri al si: *Mi mem estas ĉielo kaj infero. Ni trinku, ĉar morgaŭ ni mortos. Unu afero estas vera, ĉio alia mensogo: La floro, kiu floris, mortas. Por ĉiam.* Intelektita naturalismo estas eĉ pli simpla. Ne ekzistas objektiva vero aŭ malvero: *Ekster niaj sensacioj, ne ekzistas alia vero, nek povas ekzisti.* Jen kiel Deborim, lia granda komentariisto, resumas la filozofion de Lenin, kiu estas esence la sama kiel tiu de la konata aristokrato, kiu diris: *Ne venu al mi kun veroj: kion mi volas estas esti flatata.* Koncerne moralecon, ĉiu faru tion, kion li aŭ ŝi volas kaj povas, kaj jen la doktrino, kiu provizas la plej grandajn furorlibrojn por romanistoj, kiuj provas liberigi siajn legantojn de la timo de infero kaj de pentito. Kaj koncerne

politikon kaj juron, ne devus esti alia kriterio ol la volo de la plimulto.

Se tiuj doktrinoj triumfus en lando konsistanta ekskluzive el mensoj kultivitaj de ĉiuspecaj disciplinoj, ili estus nenio pli ol kaprico de generacio. Ili eĉ povus esti provizore utilaj, tiom kiom ili stimulus la spontanekon kaj originalecon de talentoj. Sed ne ekzistas nacioj konstituitaj de filozofoj. La kulturo de nacioj ne povas leviĝi super la elementa nivelo. Nek la naturalisma ideo povus kaŭzi grandan ĥaoson en landoj, kiuj ne spertis procezon de spirita fremdiĝo. Dudek jarojn post la revolucio, Francio restarigis sian iaman Monarkion. En iu ajn lando kun normala disvolviĝo, la ŝtonoj de malnovaj monumentoj sufiĉas por refuti la iluzion pri la supereco de sovaĝuloj. Sed kiam naturalismo komencis disvastiĝi inter la hispanaj popoloj, Hispanio estis en la agonio de febro de fremdiĝo, kaj la rezulto de la interplektiĝo de tiuj du tendencoj —fremdiĝo kaj naturalismo— estis la konfuzo de principoj, de kiu ni ankoraŭ suferas. Fremda influo povus esti kondukinta nin malrapide kaj pene imiti la virtojn

kaj sukcesojn de aliaj landoj, sed naturalismo igis nin supozi, ke ne estas necese fari grandan penon, sed nur lasi la naturon sekvi sian vojon. Tiel, ni povus imagi, ke Oksfordo kaj Kembriĝo kaj la angla industrio estis naturaj produktoj de libereco, kaj ke Sorbono kaj la riĉeco de la franca tero estis la verko de revolucio kaj ne de mil jaroj da disciplino kaj penado.

Naturalismo kaj la revolucia spirito nepre estus duoble katastrofaj en landoj kiel tiu nia, engaĝitaj en la tre longa procezo de asimilado kaj evangelizado de fremdaj rasoj, kelkaj eĉ malamikaj al la esenco mem de nia civilizo, kiel estis, en Hispanio, la multnombraj posteuloj de judoj kaj moriskoj, kaj en Ameriko, la homoj de koloro. Hispanio ne estas nur la lando de Donkiĥoto, sed la popolo de Sanĉo. Gabriela Mistral ĵus skribis, ke la popoloj de Latinameriko konsistas el du partoj indianoj, unu parto hispanoj, kaj unu parto kosmopolitoj, kaj ke se al malantaŭenirantaj rasoj oni diras de supre, fare de kleraj homoj, ke ili ne bezonas peni kaj ke tio, kio plej taŭgas al ili, estas cedi al sia spontaneco, estas probable, ke ili forlasos ĉian disciplinon. Ekde la momento, en 1767^a, kiam Bucareli, guberniestro de Bonaero, diris al la gvaraniaj ĉefoj, ke la indianoj

estas same civitanoj kiel la jezuitaj pastroj, kiuj endoktrinigis ilin, kaj ke oni instruos al ili la kastilian hispanan lingvon, sendos ilin al Madrido, kaj donos al ili la titolon de kavaliroj kaj nobeloj, la malfeliĉaj guberniestroj kaj ĉefoj, perdinte ĉian konvinkon pri la bezono daŭre klopodi plibonigi sian staton, havis neniun alian horizonton ol reveni al la primitiva ĝangalo, kaj al la ĝangalo ili revenis kelkajn jarojn poste.

Skuu la ĉenojn; rompu la tradiciajn obstaklojn; la detruan pioĉon; la bruligan torĉon. Ĉu eblas, ke iam ekzistis kultivitaj mensoj en la mondo, kiuj proklamis ĉi tiujn kiel la rimedojn kaj ilojn de progreso? Estas vere, ke inter ĉi tiuj kultivitaj mensoj estis multaj specialistoj pri medicino aŭ inĝenierarto, kiuj dogmatigas pri la filozofio de historio, kvankam ili estas same senciaj pri historio kaj filozofio, sed Rousseau kaj Russell estas du infanoj de kristana civilizo. Neniu sovaĝa popolo iam produktis Russell-on aŭ Rousseau-on. Mi memoras, ke Russell venis unu tagon en Londonon al gilda societo, de kiu mi estis membro, por paroli al ni pri la hororoj de aŭtoritato kaj la plejbonecoj de libereco en aferoj de kulturo, kaj ĉar Russell estis profesoro en Kembriĝo, mi demandis lin dum la demando-

periodo: *Ĉu vi opinias, ke la paroladoj de la fanatikuloj ĉe Marble Arch, kiuj estas liberaj, superas en intelekta plejboneco la prelegojn en Kembriĝo, kiuj estas pli-malpli kontrolitaj de la Registaro?* La respondo estis kategoria: *Ne, sinjoro.* Sed mi supozas, ke li ne komprenus, pro mia fremda akĉento, mian sekvan demandon: *Sur kio do vi bazas la superecon de libereco super aŭtoritato en kulturo?, ĉar ĝi restis nerespondita, kaj neniue en iu ajn lando povos respondi ĝin kontentige por liberalismo.*

Nun imagu, leganto, la efikojn de naturalismaj doktrinoj sur hispana familio de la regantaj klasoj. Memoru, ke la nobelaro de Filipo 4^a kaj Karlo 2^a flue parolis la latinan, ke ties edukado pri literoj kaj armiloj estis ekstreme rigora, kaj, ĉefe, ke Sanĉo ne sekvas Donkiĥoton nur ĉar li estas kavaliro, sed ĉar li faras mirindaĵojn per vortoj kaj armiloj, kiuj lin mirigas. Kaj nun metu vin en la ŝuojn de hispana aristokrato de 1780^a, ekzemple. Li komencas per konvinkiĝo, ke aferoj estas farataj pli bone en aliaj landoj, kaj precipe en Francio, ol en Hispanio. Kiel li povas pli bone prepari sin por la vivo?

Kiel li eduku siajn infanojn? Tradicio kaj ordinara racio konsilas la plej striktan disciplinon,

eĉ instruante ilin iri laŭ la vojo, kiun la homaro jam paŝis. Rousseau, aliflanke, diros al ili (Profesio de Kredo de la Savoja Vikario): *Ni revenu al la unuaj sentoj, kiujn ni trovas en ni mem, ĉar studado kondukas nin reen al ili, se ĝi ne devojigis nin de ili.* La principon de disciplino kontraŭas tiu de libera spontaneco. Nia sinjoro estas perpleksa. Kaj D-ro Simarro priskribis la efikojn de la perplekseco produktata de diskutoj en la aŭditorioj de la Ateneo de Madrido jene: *Iuj diras, ke du kaj du estas kvar; aliaj, ke du kaj du estas kvin: ni konsentu, do, ke ili estas kvar kaj duono.* La efiko de ĉi tiu konfuzo estis la progresema malstreĉiĝo de la malnova eduka disciplino, kiun sekvis, kiel fatala konsekvenco, la kontinua malkresko de la nivelo de niaj regantaj klasoj, ĝis ili falis en la absurdaĵon, kiun *la intelekta povo* nuntempe inspiras al la gvidantoj de la revolucio.

Kaj nun imagu ankaŭ la efikon, kiun la naturalisma kritiko de niaj tradiciaj institucioj havus en Ameriko —kritiko, cetere, pli pravigita jaron post jaro pro la kontinua malkresko de niaj regantaj klasoj. Nenio estas respektinda; ĉio devas esti detruita: la dinastio same kiel la nobelaro, la Eklezio same kiel la Historio, la Universitato same kiel la Akademioj, la Armeo

same kiel tio, kio nomiĝis ĉirkaŭ 1890^a *historia justeco*, kiam okazis tiu krimo sur la strato Fuencarral (nia afero Dreyfus). Kion tiu kritiko neeviteble naskis estis dekliniĝo kaj males-timo por Hispanio kaj por si mem, malplivalorigo, al kiu ĉiuj hispanidaj popoloj devis esti malplivalorigitaj, ĉar la ekzisto mem de nacioj dependas, esence, de ilia memvaloro, kaj nur per miraklo ili povus turni siajn okulojn kun amo al la patrujo. Tiu miraklo nomiĝis Rubén.

Ruben' Darío kaj talentoj.

Ĉiam ekzistis inteligentaj homoj en Hispana Ameriko, kiuj ŝatis Hispanion, nur ili estis ĝenerale puristaj verkistoj, sinjoroj de alia epoko, spiritoj konsiderataj arkaikaj, dekroĉitaj de la ĝenerala fluo de ideoj, kiu preskaŭ ĉiam estis malamika al ni, eble kontraŭe al la sekreta, sed profunda, popola simpatio. Estas kurioze, ke la ŝanĝo komenciĝis ĝuste en la jaro 98^a de niaj pekoj, kaj ke ĝin iniciatis Rubén Darío, ĝuste la plej kontraŭhispana el la verkistoj de Ameriko. Kaj ĉi tio ne estas mia opinio, sed la propra de Rubén, priskribante siajn agojn en Bonaero dum la jaroj antaŭ sia reveno al Hispanio en sia Aŭtobiografio: *Mi faris ĉian damaĝon, kiun mi povis, al la hispana dog-*

mismo, al la akademio stagnado, al la tradicio de Hermosillo, al la pseŭdoklasika, la pseŭdoromantika, la pseŭdorealista kaj naturalista, kaj mi metis miajn Rarajn Librojn el Francio, Italio, Anglio, Rusio, Skandinavio, Belgio, kaj eĉ Nederlando kaj Portugalio sur mian kapon. Kaj kiel pruvon, ke la kontraŭhispanismo de Rubén sukcesis, la poeto memoras la nekrologon skribitan por li en Panamo de iu pastro, post kiam la falsa novaĵo pri lia morto cirkulis: Danke al Dio, ĉi tiu pesto fine malaperis el la hispana literaturo... Kun ĉi tiu morto, absolute nenio perdiĝas.

La prestiĝo, kiun Rubén Darío ĝuis en Ameriko ĉirkaŭ 1898^a, ne nur ŝuldiĝis al la valoro de lia poezio, sed ankaŭ al lia ĉefa rolo en la eksterland-influata kaj naturalisma, tamen kontraŭhispana, movado ene de latinamerika literaturo. Kaj kiel povus esti alie? Kio okazis al Darío en Ameriko estis analoga al tio, kio okazis al Galdós en Hispanio, escepte ke en la kazo de Galdós, la fremda kaj naturalisma fundamento de liaj idealoj estis balancita per la hispaneco de la lingvo kaj roluloj en liaj verkoj, dum Darío estis frankofila ĝis la kerno. Kiel li rakontas al ni en sia Aŭtobiografio: *Parizo estis por mi kiel paradizo, kie oni povis spiri la esencon de feliĉo sur la tero. Ĝi*

estis la Urbo de Arto, Beleco kaj Gloro; kaj, ĉefe, ĝi estis la ĉefurbo de Amo, la regno de Revoj. Darío venis al Hispanio, tamen, pro unu el tiuj kialoj de la koro, kiujn la racio ne povas kompreni. *La gazeto La Nación*, el Bonaero, serĉis iun, kiu povus raporti pri la situacio en *la patrujo* ĉe la fino de la milito kontraŭ Usono, kaj Rubén volontulis. Kompreneble, li devus esti irinta al Kubo, por saluti la nove sendependan nacion nome de Sudameriko kaj atesti ĝiajn unuajn paŝojn en la historio; aŭ al Usono, por lerni politikan kaj ekonomian saĝon de la potenca *liberiganta* nacio. Li preferis veni al Hispanio kaj averti la popolojn de hispana Ameriko kontraŭ la nordamerika minaco.

Rubén ne plene komprenis la impulson, kiu kondukis lin al Hispanio fine de 1898^a. Nek li provas klarigi ĝin en sia Aŭtobiografio. Sed lia pli posta verko montras al ni, ke li sentis, vage, de la komenco mem, tion, kion ni hispanoj nur multajn jarojn poste komprenis. La Hispana-Usona Milito estis epizodo en la antikva konflikto inter la hispanida mondo kaj la anglosaksaj nacioj. Kaj kvankam ni hispanoj defendis nin, per ĵurnalista propagando, tiel mizere, ke ŝajnis, ke ni ne batalas en Antiloj kaj Filipinoj, sed prefere por doganprotektismo kaj la rajto daŭre

nomumi publikajn dungitojn — aferoj, pri kiuj ni eble ne pravis — la vero estas, ke ni faris la batalon de ĉiuj hispanidaj popoloj. Kaj la tagon, kiam ni mallevis la flagon ĉe El Morro en Havano, la ombro de la steloj kaj strioj de Usono komencis minaci super ĉiuj hispanaj popoloj de Ameriko.

Rubén Darío inspiriĝis el la emocio de venkita Hispanio por siaj *Kantoj de vivo kaj espero*. Kia titolo, konsiderante la kontraston kun la regeneraciisma prozo, kiun la katastrofo vekis en Hispanio! La unua el ĉi tiuj Kantoj estas *Salutación del optimista* (Saluto de la Optimisto), la sola hispan-usona himno, kiun ni havas. Se instinkto por savo movus nin prepari la spiritojn de novaj generacioj por la defendo de hispanidaj teroj, ne ekzistus ceremonio, en kiu ne estus deklamataj la magiaj strofoj:

Gloraj kaj fekundaj rasoj, sango de fruktodona Hispanio, frataj spiritoj, lumaj animoj, saluton!

La temo de la defendo de Hispanidad plenigis la animon de la poeto dum tiuj jaroj. Ĝi aperas en liaj pli mallongaj kaj pli longaj poemoj, en *Cyrano en Hispanio*, en liaj *Portretoj*: Don Gil, Don Juan, Don Lope..., en la *Litania de Nia Sinjoro Don*

Kiĥoto, kaj en la *Saluto al Reĝo Oscar*, kie ni trovas tiujn frazojn: *Dum la mondo spiras..., dum ekzistas... kaŝita Ameriko trovebla, Hispanio vivos.*

Jen la ŝildo defianta Roosevelt-on, la alian Roosevelt:

Atentu. Vivu Hispana Ameriko!

Kaj ĉar vi havas ĉion, unu afero mankas al vi: Dio!

La samaj cignoj, kiuj povas simboli ĉion fremdan kaj naturalisman en la poezio de Rubén, igas lin demandi:

Ĉu ni estos transdonitaj al la sovaĝaj barbaroj? Ĉu tiom da milionoj da homoj parolos angle? Ĉu ne plu ekzistas noblaj sinjoroj aŭ kuraĝaj kavaliroj? Ĉu ni silentos nun nur por plori poste?

Ĉi tie Rubén finiĝas kiel poeto de *Hispanidad* (Hispaneco). Li ankoraŭ devas verki kelkajn el siaj plej bonaj poemoj. Li jam komponis la majstraĵon de sia fremdeco, la *Responso a Verlaine*, absurda kiel koncepto, ĉar, kion tiu tuta fantazia splendo rilatas al la malfeliĉa poeto de Sagesse?, sed kaptiva per sia beleco de vortumo. Poste li verkis la plej superan poemon de sia naturalismo, la *Poema del Otoño* (Poemo de l' aŭtuno), kiu finiĝas: *Ni iru al la regno de Morto —laŭ la vojo de Amo, ĉar ĝia*

naturalismo, efektive, estas la morto de animoj kaj de la popoloj kie ĝi regas. La vero, kompreneble, estas la malo: *Ni iru al la regno de Amo —laŭ la vojo de Morto.* Por momento li ŝajnas penti pri sia antaŭa aŭdaco kaj konsili al la hispanamerikaj popoloj akcepti nordamerikan gvidadon, ĉar en la *Vaganta Kanto* ni trovas la *Saluton al la Aglo*:

Bonvenon, magia Aglo kun grandegaj kaj fortaj flugiloj, por etendi vian grandan kontinentan ombbron super la Sudo...



Ruben Darío, aŭtoro nikaragŭa de *Kantoj de vivo kaj espero*



Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels140.pdf>

Numero 140^a Julio de 2026^a



ISSN 1886-1938 (printita)

ISSN 1886-1997

Depósito legal: Z-2398-88